# *Vicprezidanto de Kubo interparolis kun ?efministro de Ruando*



**Foto: PL**

Havano, nov 21 (RHK) La vicprezidanto de Kubo, Salvador Valdés Mesa, renkonti?is ?i-lunde kun Édouard Ngirente, ?efministro de Ruando, lando kie li estas en oficiala vizito.

Per sia konto pri X, Valdés Mesa priskribis la agadprogramon de sia vizito al la afrika nacio kiel tre fruktodona.

En la dialogo kun Ngirente, la kuba reprezentanto ratifis la sindevontigon de la plej granda el Antiloj labori por pliigi kunlaboron en ?iuj sferoj kiuj kontribuas al la prospero de amba? popoloj.

“Mi plenumis intensan kaj tre fruktodonan programon de agadoj ?i-lunde en Ruando. En dialogo kun la ?efministro, Édouard Ngirente, mi ratifis la enga?i?on de #Kubo labori por pliigi kunlaboron en ?iuj sferoj kiuj kontribuas al la prospero de amba? popoloj."

La Vicprezidanto de Kubo komencis  sian oficialan viziton al Ruando, la lasta celo de turneo, kiu komenci?is ?i tiun 13-an de novembro tra nacioj de la afrika kontinento kiel Ganao, Gvineo Bissau kaj Etiopio.

Lunde Valdés Mesa estis akceptita de Paul Kagame, ?tatestro de Ruando, kun kiu li diskutis pri manieroj plifortigi la duflankan kunlaboron.

Krome, li interparolis kun Kalinda Francois Xavier, prezidanto de la Senato de Ruando, al kiu li ratifis la volon de la Kuba Parlamento labori por plifortigi ekonomiajn kaj politikajn rilatojn inter amba? landoj.

La oficiala delegacio de la insulo konsistas anka? el Tania Margarita Cruz Hernández, unua vicministro pri Publika Sano, kaj Ángel Villa Hernández, ?enerala vicdirektoro pri Duflankaj Aferoj de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/339956-vicprezidanto-de-kubo-interparolis-kun-cefministro-de-ruando

Radio Habana Cuba